

Sentenco	Editorajhoj
<p>Oni neniam faru la saman stultajhon dufoje: La elekteleco ja estas sufiche granda.</p> <p>Jean Paul Sartre</p>	<p>Redaktofino de  n-ro 6/00: 15-09-2000 Eldonanto: <i>Hamburga Esperanto-Societo r. a.</i> Klaus-Groth-Str. 95, D-20535 Hamburg Tel/Faks: +49 40 250 30 65</p> <p>Prezidanto: Jürgen Wulff http://www.juergenwulff.de</p> <p>Redaktoro: <i>Benno Klehr</i> Stormsweg 7 22085 Hamburg Tel: 0 40-43 18 83 47</p>
<p>La HES Klubejo estas malfermita Jhaude ek de 19:00 h. Programo: 20:00 h. GIS: kunvenoj laubezone; Informoj: Tel. (040) 58 71 82 au 39 19 44 14</p>	<p>Das Haus des Esperanto Vereins Hamburg ist geöffnet donnerstags ab 19:00 Uhr. Programm: 20:00 Uhr GIS: Zusammenkünfte nach Bedarf; Information: Tel. (040) 58 71 82 oder 39 19 44 14</p>

Universala Kongreso en Tel-Avivo

Jam ein 1967 estis planita U. K. en Israelo; tiam ghi ne okazis pro la t. n. Sestaga Milito. Dum la pasintaj jaroj la situacio inter Israelo kaj siaj najbaroj per multa intertraktado plibonighis. Tamen la konferenco en Camp David (Usono) antau nelonge malsukcesis, char Israelanoj kaj Palestinanoj postulas Jerusalemon kiel chefurbo de siaj shtatoj. Mi esperas, ke la U. K. okazos sen problemoj, kaj deziras sukceson al la partoprenantoj.

Benno Klehr

Augusto	Septembro
3 Preparoj por la ekspozicio Du und Deine Welt	7 <i>Monika Jessel:</i> Kulturkolonialismo en Europo
10 Video: Mazi en Gondolando	9 Proveciono 14.00 h
17 Preparoj por Du und Deine Welt	14 <i>Werner Bormann:</i> Universala Kongreso en Tel-Avivo 2000
24 <i>Gerald Roemer</i> Parizo kaj Liono	21 <i>Jutta Sültz:</i> La Chaux-de-Fonds
31 Unuaj impresoj de Du und Deine Welt	30 Video: Mazi en Gondolando

Schnupperkurs

am 9. September um 14.00 Uhr

im Esperanto-Haus Hamburg

**Ekspozicio en Hamburg Du und Deine Welt de 25.8. ghis 3.9.2000
kun informstano pri la Internacia Lingvo Esperanto**

Gull's Pick Hotel

Antau nelonge mi vizitis mian onklinon en Bavario, okaze de shia 91a naskighdatreveno. Por ke mi estu proksime al shia loghejo, mia onklino invitis min, loghi en hotelo Mövenpick en Neu-Ulm. La Germanan vorton por mevo oni kutime skribas Möwe, sed bone, temas pri propra nomo de entrepreno.

La hotelo estas moderna, bone ekipita, sufiche multekosta kaj belege situata apud la bordo de la rivero Danubo, vid-al. vide de la historia urbocentro de Ulm, konata pro ghia gotika katedralo.

Kiam mi alvenis, mi ricevis mgnetkarton kiel shlosilo por la chambro. Ne estas ekstraordinare en moderna hotelo. Ankau ne estas ekstraordinare, ke sur tiu karto trovighas varbajho por ia fruktosuko, vendata en la hotelo. Bone, Mövenpick ne estas Germana sed Svisa entrepreno, sed ech ne en unu el la Svisaj lingvoj (Itala, Franca, Germana), sed ekskluzive en la Angla lingvo trovighas klarigo, kiel uzi tiun karton por malfermi pordon. Same en la chambro oni trovas indikilojn kiuj nur prezentas Anglanlingvon. Chu tranokta prezode pli ol ducent markoj ne sufichas por instali pliajn indikojn? Mir proponas al tiu chi entrepreno konsekvence shanghi sian nomon al Gull's Pick.

Benno Klehr

[Re al Esperanto en Hamburg](#)